


# Franca partizana kanto

Muziko : Anna Iourievna Smirnova-Marly

Paroloj : Eva Farkas-Tatar




Ĉu aŭ-----das vi vo-----ĉon sur kam-----poj de laŭ-----taj kor



ni-----koj

Ĉu aŭ-----das vi ĝe-----mon de



pa-----tro--land' pro ma---la-----mi-----koj

Ha



ho, par ti--zan' ! vo-kas kna-bo kaj kna-bin' al al----ar-----mo

Por



mon---tri va--lo ron de pa---tri---o--ta san---go kaj lar-----mo.

Ĉu aŭdas vi voĉon sur kampoj de laŭtaj kornikoj.  
Ĉu aŭdas vi ĝemon de patroland' pro malamikoj.  
Haho, partizan' ! vokas knabo kaj knabin' al alarmo  
Por montri valoron de patriota sango kaj larmo.

Disŝiru katenon disrompu karcerojn, ho frato.  
Se pelas sovaĝaj servuloj aŭ mordas malsato.  
Atendas aliajn ripozo, milda lito paciga.  
Ni luktas senlace, minacas vane vundo mortiga.

Ni scias ja ĉiuj gravecon de nia epoko.  
Se falas ja unu, aliaj tuj estas en loko.  
Se sangon fidelan elverŝos ni por brula ofero,  
Ni tamen fajfante marŝadas al dolĉa Libero.

*Tiu « Chant des partisans » estas fama en Francio, kvazaŭ nacia kanto. Tamen ĝi venas de tuta Eŭropo. Komponita en la medio de « Libera Francio », en Britio, ĝian muzikon komponis Anna Iourievna Smirnova-Marly, el Rusio. Francaj paroloj venas de Joseph Kessel, kies deveno estas juda-litova-rusa, kaj lia nevo Maurice Druon. Esperantaj paroloj estas de Eva Farkas-Tatar, el Hungario*

-----  
*Le « Chant des partisans » est célèbre en France, presque comme un hymne national. Mais il vient de toute l'Europe. Composé dans les milieux de la France libre, en Grande-Bretagne, la musique est de Anna Iourievna Smirnova-Marly, d'origine russe. Les paroles françaises sont de Joseph Kessel, d'origine judéo-russo-lituanienne, et de son neveu Maurice Druon. Ici, les paroles en espéranto sont de Eva Farkas-Tatar, de Hongrie.*

[https://fr.wikipedia.org/wiki/Le\\_Chant\\_des\\_partisans](https://fr.wikipedia.org/wiki/Le_Chant_des_partisans)  
[http://kantaro.ikso.net/marsxo\\_de\\_francaj\\_partizanoj](http://kantaro.ikso.net/marsxo_de_francaj_partizanoj)



Europe  
Démocratie  
Espéranto

<https://e-d-e.fr/>

<https://e-d-e.org/>